

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 17 - Oktobro - Novembro - Decembro 1991

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

Nia mikrokosmo

Nia movado estas ia "mikrokosmo" en la "makrokosmo", kiu estas la mondo. Sed nia mikrokosmo nur ne-perfekte respegulas la mondon, tute simple ĉar ĝia denseco ne estas ĉie egala kaj unuforma. En iaj lokoj ĝia diafaneco estas tia, ke ĝi respegulas nenion krom sian ne-ekziston kaj vantecon!

Tiu fenomeno aspektas ankoraŭ pli drasta, se ni konsideras diversajn organojn sukcese kreitajn de nia movado. Mi aludas precipe la komitaton de UEA kaj la Akademion mem. Ĉiu trovos kelkajn aliajn ekzemplojn.

Tiuj organoj principe kaj ideale reflektas unue nian mikrokosmon sed lastanalize la mondön.

Nun ni povas respondi al homoj, kiuj ŝatus vidi en tiaj organoj kaj specife en la Akademio reprezentantojn de ĉiuj nacioj! Tutsimple, matematike simple, se nacio ne konas nian movadon, ĝi ne kapablos proponi membron al nia Instituto. Nur aldone ni rimarkigu ion same simplan, nome, ke la Akademio disponas pri nur 45 membroj, dum la nacioj oficiale agnoskitaj nombriĝas je ĉirkaŭ 180; kaj kio pri la multaj aliaj? La afero korektiĝas de si mem: tra la tempo homoj el tre diversaj nacioj membriĝis en la supera Zamenhofa organo. Principe membroj apartenas al ĉiu ajn nacio.

Simila problemo estas tiu plurfoje kaj lastatempe levata de diversaj feministoj, pardonu: gefeministoj. Nuntempe en diversaj parlamentoj sukcesas enveni malgranda minoritato da virinoj; konsiderinda progreso rilate al pli fruaj tempoj, en kiuj feminoj tute ne deziris okupiĝi pri politiko kaj en kiu viroj tute ne estus ŝatintaj, ke virinoj enmiksiĝu. Versajne tiuj gefeministoj opinias, ke nia movado meznombre estas nete supera al tiu de la socio de niaj makrosocietanoj. Kio restas demonstranda!

Preter tio ni devus ekscii pri la denseco de virinoj inter ni. Jam Waringhien rimarkis, ke ili tute mankas en konkurencaj movadoj, kiuj vane luktis por Ido, Occidental... Kaj per ekstrapolado ni povas supozi, ke virinoj vere aperas nur en tiuj partoj de la movado, kiuj komencas flori, kio siaspece estas normala! Ĉu ne?

Nun estas tri virinoj inter ni, Akademianoj. Ni diru: unu el dekkvin! Ili rajte povus esti pli multaj. Sed necesas, ke ili kandidatiĝu same kiel la viroj, ke ili minimume penu por prezenti sin kiel kandidatinojn! Antaŭe necesas, ke ili ekzistu! Feministino skribis al ni sian indignon, ke ne estas pli da feminoj inter ni! Sed konklude, ŝi aldonis: "mi ne proponas min!" Ŝi certe pravus, se ŝi opinias, ke la propra nivelo ne pravigus tion. Ŝi nepre malpravus, se la situacio estus mala.

D-ro André ALBAULT

Kun bondeziroj

por la nova jaro!

Sian mentoron la movado perdis

La 20-an de Decembro mortis **Gaston Waringhien**, membro de la Akademio de Esperanto kaj ĝia iama prezidanto (1963 - 1979)! Li estis ankaŭ membro de la konsilio de la "Amikoj de l'Akademio", kiun li varme subtenis.

Je la 8-a 30 ĉe la funebra foriro al Aigné, eta komunumo proksime kaj nord-okcidente de Le Mans (Sarthe), krom du parencoj venis 15-o da esperantistoj por forsaluti nian amikon. Inter ili la nepo de la Iniciatoro, inĝ. Zamenhof-Zalewski, diris kelkajn personajn vortojn pri la malaperinto. Ĉeestis k-do Peyraut, prezidanto de SAT. Jean Thierry nome de la Akademio kaj de la "Amikoj" prizorgis flor-garbon; aliaj floroj salutis nome de UEA, kies prezidanto, Prof. John Wells povis alveturi kaj prezenti kondolencan paroladon en tiu frua mateno de la 24-a de Decembro.

*

La tuta movado perdas homon, kiu multon faris por ĝi.

Li estis, kiel ĉiuj scias, ne nur la ĉef-redaktoro de la Plena Ilustrita Vortaro kaj verkinto kune kun Kalocsay de la Plena Analiza Gramatiko, kiu aperis eĉ per 5 eldonoj, sed ankaŭ li estis multo alia!

Kiel verkisto li estas konata ĉefe pro siaj eseoj, kiuj kovras esperantologion, literaturon kaj komparan literaturon sed ankaŭ filozofion.

Preleganto, li estis ĉe plej diversaj okazoj, sed precipe en la Somera Universitato okaze de la Universalaj Kongresoj.

Kiel organizanto oni sciu, ke li majstre restarigis la Akademion, kiam en 1962 li estis elektita ties Prezidanto kaj mi mem Sekretario. Li certe estis ĝia plej bona prezidanto, krom eble rektoro Boirac, nomita de Zamenhof en 1905. Li kreis la Francan Esperanto-Instituton kune kun ties bazaj ekzamenoj kaj bazaj instruiloj.

Per la perdo de Waringhien la tuta movado estas orfa: ĝi perdis sian mentoron, kiun multaj, ne nur Parizanoj, konsideris kiel sian amikon; ĉar la homaj kvalitoj de la homo Waringhien konsistis ne nur el mensaj elementoj sed ankaŭ el koraj elementoj: ĉio en li estis farita el takto kaj mezuro, krom el homa kaj homara amo. Necesis penetri en la rondon de amikoj de nia Amiko por tion konstati.

D-ro André ALBAULT

Ankoraŭ unu fojon

kun Waringhien

Skizinte la historion de la 70 unuaj jaroj de la Esperanto-movado Waringhien (en Lingvo kaj Vivo 1959 : p. 397 - 423) montras la ĝustecon de la taktiko de Zamenhof kaj de la Esperanto-pioniroj ankaŭ per la sukces-manko de niaj rivaloj (Idiom Neutral, Ido, Occidental, . . .). Tiuj kredis, ke la bonigo de flanko aŭ alia de la lingvo venigos al ili la klientojn; sed "tia merkato, kian ili imagas, tute ne ekzistas". Kaj studinte la tri kategoriojn konsistigantajn tian merkato, li alvenas al la plej grandnombra kategorio de simplaj instruistoj, laboristoj, turistoj aŭ senokupaj virinoj kaj konkludas : "ni devas krei mem la merkaton, antaŭ ol vendi nian varon. Kaj tion ni atingos nur" per nia persistado kaj ĉiuf-lanka laborado. Kaj li daŭrigas (p. 421) :

Sed por nutri en ni tian obstinon, tian persiston, tian konstantecon, malgraŭ la obstakloj, la malsukcesoj, nia laciĝo, la indiferentecon de unuj, la malamikeco de aliaj — ne sufiĉas la malvarma imago de tiu teknika progreso, kia estos la ĝeneraligita uzado de lingvo internacia. Tiajn oferojn de fortoj, de tempo, de mono, eĉ de sano, postulatajn el niaj propagandistoj, tiuj ĉi povas konsenti nur favore al pli alta, pli nobla, pli korvarmiga celo. Kaj tian ĝuste Esperanto, kaj nur Esperanto proponas al ili, tiu lingvo, en kies nomo mem kuŝas la espero alporti al la homaro rimedon de spirita progreso kaj instigilon al interpopola paciĝo.

Mi ja scias, ke oni ofte troigas, aŭ pli ĝuste, simpligas la eventualan pacigan efikon de lingvo internacia. Evidente, ĝi per si mem estas nur ilo, kiun oni povas utiligi tiel same por milito, kiel por paco. Sed kio gravas, tio estas ne la lingvo sola, sed la interrilatoj, kiujn ĝi ne nur ebligas, sed iniciatas. La tuta valoro de Esperanto kuŝas en tio, ke ĝi iom post iom allutimigas la anojn de diversaj nacioj ekkomuniki senpere inter si, ke ĝi vekas en ili aspiron kaj volon interŝanĝi ideojn kaj sentojn kun aligentanoj. Kaj tia kutimo, se ĝenerali-gebla, estus ja giganta progreso al pli paca stato de la mondaferoj. Ne estas mi, sensperta privatulo, kiu tion asertas; estas la estro de unu el la du plej grandaj regnoj en la mondo, prezidento Eisenhower, kiu, la 11-an de Aprilo 1958, deklaris al reprezentantoj de la 51-a konferenco de la Aeronautika Internacia Federacio, ke "la registaroj estas pli stultaj ol iliaj popoloj", kaj ke "la pli granda parto de la internaciaj malfaciloj malaperus, se la popoloj havus pli oftajn kontaktojn unu kun la alia". Ĉu tia konfeso ne estas ankaŭ ia timema kaj konfuza agnosko de tiuj du grandaj interligitaj veraĵoj, la unua, proklamita de Emery Reves, ke la sola solvo de la nuntempaj krizoj estas la starigo de unu tutmonda regno — kaj la dua, demonstrita de Eŭgeno Lanti, ke nur vasta sistema uzado de Esperanto povas krei la sennaciecan spiriton, kiu ebligas tian unu regnon, kaj ke nur ĝi helpas liberigi la homon en unuecigita mondo?

Jen do la vojo, kiun la historio montras al ni sekvenda, se ni volas certigi la finan triumfon de tiu ekzalta entrepreno, unu el la plej aŭdacaj, kiujn iam konceptis homa cerbo. Ni atingos la celon uzadante ĉiajn rimedojn, por klarigi kaj pruvi al kiom eble plej multaj homoj la utiligeblecon de Esperanto sur la praktika kaj intelekta kampo; jam la konsiderindaj rezultoj atingitaj de nia movado, kiujn mi resumis en la antaŭaj paĝoj, garantias al ni, ke la nuntempaj kaj la estontaj penoj ne estos pli vanaj, ol estis la pasintaj; ke niaj konkeroj iom post iom fariĝos tiel atentindaj, ĝis ili sin trudos al la plej malfidemaj, al la

(Fino sur paĝo 7)

"LINGVO-JURISTAJ KONSIDEROJ PRI ESPERANTO"

Sub tia titolo alvenis referaĵo de *S-ro Helmut Welger el Marburg (Germanio), "Rechtsanwalt Dipl.-Psychologe"* (advokato diplomita pri psikologio).

Temas pri la konsidero de la "parolantaro de Esperanto" kiel popolo kun "konstiuciaj leĝoj": la Fundamento kaj la Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (mallonge : Bulonja Deklaracio), oficiale akceptitaj la 9-an de Aŭgusto 1905.

El tio S-ro Helmut Welger konkludas, ke "juristaj metodoj ofte estas pli adekvataj ol lingvistikaj, por ekkoni, kio estas ĝusta, kio malĝusta en Esperanto."

Jam unu rimarkon trudas la sperto pri tia aserto. Jura fonto estas tradicie triparta : 1-e / la jura doktrino kaj 2-e / la juraj tekstoj (pri kiuj aludas la ĉi-supra tezo), sed 3-e / la jurisprudenco, kiu koncernas ankaŭ la uzadon, la kutimojn, kaj la antaŭajn decidojn pri apartaj similaj aŭ analogaj kazoj.

*

Nu, — ke la "Esperantistaro" prezentiĝas kiel organizaĵo memkonscia aŭ ne, kun "membraro", "decidorganoj" kaj "Fundamento", tio ŝajnas ĝusta jure kaj fakte;

— ke la "decidorganoj", nome la "Universalaj Kongresoj" de la "Esperantistaro" kiel "suvereno de Esperantujo" estas relativaj laŭ tio, ĉu la partopreno en la Kongreso plene reprezentas la tutan Esperantistaron, ankaŭ tio ŝajnas ĝusta;

— ke la "Fundamento" estas plene valida laŭ la "Antaŭparolo" ĝis la "lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj", kies lingvoj ne hazarde sed historie koincidas kun "la unuaj kvar lingvoj de la kvinlingva Fundamenta Gramatiko", ankaŭ tio estas ĝusta;

— ke la "aŭtoritata centra institucio (tradicie : Akademio de Esperanto)" rajtas nur "pligrandigi (neniam ŝanĝi) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj", ankaŭ tio estas ĝusta;

— eĉ ke la stilo de la "iniciatoro" de Esperanto estas laŭ la Bulonja Deklaracio rekomendinda "pro plena unueco de la lingvo", ankaŭ tio estas ĝusta;

— kaj fine ke oni ne eraru "pri la Zamenhofa uzo de la vorto *logiko*", kies "kunteksto ĝenerale montras, ke ne temas pri strikta deduktado el donitaj premisoj" (sekve ne pri matematika rezonado), sed pli bone el lingvistika analogio, ankaŭ tio estas ĝusta.

*

Sed, en la apliko devas interveni la jurisprudenca interpretado kaj kutimado.

Ne sufiĉas doktrino por pravigi sisteman uzon de tiom anstataŭ tiel, se ne : oni senigas sin je valoraj nuancoj laŭ la bonaj ekzemploj de Zamenhof mem : "La Esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion tiom perfektan, ke nenio pli alta povus ekzisti" aŭ "Li estas kiel verkisto, tiom inteligenta, kiom stulta, kiel financisto. [PAG, p. 120-121].

Ne sufiĉas kontraŭstarigi juristan doktrinon al "lingvistikaj metodoj" por nei, ke la ago forgesi en si mem ne havas daŭron, krom se ripetado : aŭ vi forgesis, aŭ vi ne forgesis, sed ĉu vi estas forgesanta?

Ne sufiĉas ĵongli per "senco-ekvacio de kunmetitaj vortoj : F+C = subspecto de C, iele specifita per E" por nei la "gramatikan karakteron" de la Fundamenta senco de radiko, se ne : kiel klarigi, ke patr-o estas preferinda formo ol patr-ant-o aŭ patr-ul-o?

Ĉu estas bezonataj "lingvojuristaj konsideroj" por kompreni la frazon *Unu vidvino havis du filinojn*, dum *unu* signifas "unu el certaj konataj de mi", kaj iu ajn numeralo povas esti aŭ adjektivo, aŭ pronomo, aŭ substantivo laŭ la kunteksto? Ĉu estas bezonataj lingvojuristaj konsideroj eĉ por deklari evitinda la uzon de "far" kiel prepozicio, dum proverbo memorigas, ke "Unu, du tri, kvar, kaj finita la far'!"

El teorio kaj sistemo . . . ne ĉiam finiĝas problemoj!

(J. T.)

Postnoto : ankaŭ evidentas ke *la far'* neniel estas *far* : temas pri du malsamaj vortoj. (A. A.)

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

”Ne gravas, se foje vi ne konsentas . . .

La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj!

La sola problemo estas konscii pri tia neceso . . .

Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!”

*

D. – En recenzo aperinta en VEVEZUELA STELO, n-ro 49 (Okto-
bro 1991) pri ”La Letero de l’ Akademio de Esperanto” n-ro 15 (Aprilo-Ma-
jo 1991) oni povas legi sub la plumo de Ing. Félix García Blásquez jenan kri-
tikon.

”Por refuti rezonadon, simple oni transskribas tekston de alia aŭtoro (p. 5) kio konsti-
tuas sofismon nomatan ”ad aŭtoritatem”. Rilate al la artikoloj de la kunlaborantoj, okazas
preskaŭ la samo, ĉar ekzemple en unu el ili (p. 7), pli ol 65 % de la teksto estas transskribo
de fragmento de iu el la menciitaj verkoj. Do, la publikaĵo aspektas kiel reklamilo de PIV
kaj PAGE.”

R. Restu en la reespondeco de Ing. Félix García Blásquez la uzo de la vor-
to ”sofismo”, precipe se temas pri aŭtoritateco de la ”PLENA ILUSTRITA
VORTARO” kaj ”PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO”.

La ĉefa estas ne misprezenti citaĵon. La plena citaĵo ja estas : Ja la lingva logiko ne
estas rigore matematikeca, ĝi rezultas pli ĝuste el psikologia koncepto kaj reprezentado de
la mondo; kaj la homa konscio konsentas prezenti agon, kvazaŭ sen ekstera aganto, kvazaŭ
la subjekto agas per si mem pro fataleco aŭ personecigo, eĉ se en la realo ĝi estas inerta kiel
en ekzemploj : ”Kio vendiĝas kaŝite . . .” * aŭ en ”La libro legiĝas facile” . . . Tion oni
kutime nomas la mediala voĉo inter la aktiva kaj la pasiva” . . . ĝi estas tre konata interalie
en la Hellena lingvo.

Sed la recenzinto estas inĝeniero kaj rifuzas, ke ”oni ne matematike rezonu pri ĉiuj
psikologiaj konceptoj de la homa mensol!” Tial li skribas : ”Oni forgesas, ke laŭ la Funda-
mento la lingvo Esperanto devas emi al perfektigo, tio estas raciigo, elimino de esceptoj, de
kontraŭdiroj, ktp” (p. 10).

Al kio respondas ĝuste D-ro L. L. Zamenhof mem : ”Anstataŭ *sidigu* estas pli bone di-
ri *sidigu vin* aŭ *eksidu* : tamen ĉar la formo *sidigu* jam de tre longe estas uzata preskaŭ de
ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam ”esperantismo” kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas .
. . Se ni postulas ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzo de lingvo artefarita fariĝas
tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de
uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi
ĉiun sian vorton.” [L. R. n-ro 13].

Sed kompreneble por inĝeniero D-ro L. L. Zamenhof, D-ro K. Kalocsay kaj Prof. Ga-
ston Waringhien eraras, eĉ se la iniciatoro deklaris : ”Komuna ĝisnuna uzado devas ludi en
lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco.”

(J. T.)

*) ”Kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite” ekzemplo de D-ro L. L. Zamenhof mem.

Ekzempli kaj ekzempligi

Laŭ mi tiuj du verboj implicas malsamajn subjektojn :

(1) Konkretaĵo (la ekzemplo) ekzemplas ĝeneralaĵon :

Tiu proverbo ekzemplas la regulon [PIV] (sekve, La regulo estas ekzemplata DE tiu proverbo).

Harpagono tradicie ekzemplas la tipon de avarulo.

(2) Iu (la verkanto) ekzempligas ĝeneralaĵon per konkretaĵo :

Moliero ekzempligis la tipon de avarulo per Harpagono.

Multaj verboj havas tian paradigmon :

(3) *En la prahistoriaj ŝtondesegnoj, rado SIMBOLAS la sunon [PIV]. – La Helenoj SIMBOLIGIS la pacon per la olivarbo [PIV].*

(4) *Jordano LIMAS oriente la landon^x. La statuto LIMIGAS strikte la povojn de la direktoro [PIV].*

En tiuj ekzemploj -ig proksimas al la scienca sufikso -iz (atribui ion, provizi je io), sed per iom streĉa analizo, oni povas pravigi la pasivan "igadon" laŭ (2) :

La Helenoj igis la pacon (esti) simbolata de la olivarbo. –

Moliero igis la tipon (esti) ekzemplata de Harpagono. (Kp. Petro konstruigas domon PER Paŭlo = Petro igas la domon «esti» konstruata DE Paŭlo.).

Komprenoble, tiu reg-paradigmo ne estas la sola ĝusta. Por aliaj semantikaj grupoj verbigo efikas alie, ekz-e, por la il-nomoj tute natura signifo de la senpera verbigaĵo estas "agi per la ilo" (*brosi, marteli* ktp, i. a. *signi*). Pli malbonas, ke semantike proksimaj verbigoj kun la ĝenerala senco "prezenti, reprezenti" kondukas diverse :

(3') *Tiu ŝtonamaso SIGNAS la vojon [PIV] (simile al SIMBOLI).*

Traleĝinte la lokojn, kiujn vi SIGNIS per ruĝa krajono^z ... (4') Ĉenaĵo da moneroj, kiuj FORMIS belan kolumnon^z (ĉi tio estas tute simila al LIMI). – Ĉiu povas el unu vorto FORMI diversajn aliajn^z.

La formo bildigi (*Li ĝoje bildigis al si la surprizan mienon de la infano [PIV]*) implicas, ke la senpera verbigo bildi povus signifi *figuri, esti bildo de io*; dum la senpera verbigaĵo portreti signifas "fari portreton" : *tiel li estis portretita^z.*

Analogan heziton oni konstatas pri ordi k.s. :

(5) *La afero estas bonorda kaj ĝenerale ĉio ORDAS! – Ni devos interrompi la eldonadon, ĝis ni tute ORDIGOS la aferon^z. Tamen : Neniu ORDIS la longan ruĝan meĉbrulaĵon^z.*

Konklude mi konstatas, ke en la koncerna semantika grupo ni havas plurajn paradigmojn; tion mi opinias bedaŭrinda, sed nun estus entrepreno malrealisma provi unuecigi (do, ŝanĝi) la uzadon de kelkaj ofteĝaj malregulaĵoj, kiaj *nomi, formi, formuli*; tamen almenaŭ oni evitu homoniman verbigon ĉiam, kiam ankoraŭ eblas.

(S. B. Pokrovskij, el Novosibirsk)

Participaj finaĵoj uzataj anstataŭ verboj (!?)

D. – Kiel redaktoro de E-gazeto, mi ŝatus scii, ĉu estas korekte uzi la participajn finaĵojn -ita, -ata, -ota, -inta, -anta, -onta, kiel en jenaj frazoj. Almenaŭ mi konsideras ilin malfacile kompreneblaj por multaj Esperantistoj. Jen ekzemploj :

Oni principe ne povas esti punata A) por la fakto ke la suferinto "sentas" la krimon pli akre ol alia suferinto, nek B) pli severe ol alia persono kriminta en samaj cirkonstancoj, nek C) por siaj karaktero kaj filozofio, nek D) por krimo ata de alia persono.

Tre ofte la punoj estas malsamaj laŭ severo, en similaj kazoj, pro la tute malsamaj rezonkaj juĝ-manieroj de la diversaj juĝistoj, aŭ pro la diversaj juĝistoj, aŭ pro la diversaj sociaj specoj de homoj, ekz-e, la mortigo ante policanon aŭ politikiston estas konsiderata kaj punata pli grave ol ante "ordinarajn" homojn.

(K. Br.)

R. – Jen efektive freŝa uz-maniero de la participaj finaĵoj, kiu (verŝajne sub la influo de la Pirona "bona lingvo") bedaŭrinde ne tial . . . stile klarigas la frazon!

Laŭ la FUNDAMENTO -ant-, -int-, -ont- estas nuraj participaj finaĵoj aktivaj, kaj -at-, -it-, -ot- la pasivaj, eĉ respektive "imperfektaj, perfektaj kaj prediktaj" (kiel precizigas Plena Analiza Gramatiko).

Kvankam D-ro L. L. Zamenhof en 1908 proponis al la Lingva Komitato permesi la uzon de la verbaj finaĵoj -as, -is, kaj -os kiel neologismojn de la verbaj formoj : *estas, estis, estos* (laŭ la iniciato de Grabowski, kiu mem konsideris tion nur poezian licencon), estas konstateble, ke neniu tion imitis eĉ poezie (PAG).

Kompreneble tia uzo de participaj finaĵoj baziĝas sur la subkompreno de radiko teorie necesigita de la kunteksto, ekzemple : "por krimo (far)ata de alia persono". Sed ne ĉiam la komprenebleco estas tiel evidenta, kaj sekve pro tro ofte malklara stilo tia uz-maniero de finaĵoj neniel estas rekomendinda.

(J. T.)

WARINGHIEN, (fino de la paĝo 3)

plej malfavoraj okuloj; ke, kiam la registaroj enkondukos ĝin oficiale en la lernejojn, ili simple limigos sin al la rekono de fakto. Jes, tio estas espero, kiun apogas malvarma analizo de la situacio. Ĉar se io estas evidenta al ĉiu, kiu scias legi en la lingvaj kaj sociaj fenomenoj, tio estas, ke Esperanto estas definitiva akiraĵo de la homa kulturo.

Kaj ĉe tiu kuraĝodona konkludo de mia fluga esplorado super sepdek jaroj da esperantismo, mi ne povas malhelpi min rigardi malantaŭen, al tiu varma tago de Julio 1887, kiam eliris el la presejo la maldika, griza, 38-paĝa broŝureto, kiu entenis en si la ĝermon de tiu revolucio. Kaj mi ne povas ne saluti kun pietato tiun humilan okuliston, kiu, post jaroj da interna kaj ekstera batalado, da mizero kaj baraktado, nun, staranta sur la suna sojlo de la presejo Kelter, per tremantaj manoj foliumas la unuan ekzempleron de la verketo, kiu famigos lian nomon, fondos Esperanton, kaj eble, iam, donos la pacon al ĉiuj "filoj de Dio" . . .

Denove pri feminismo

D.- En La Letero de l' Akademio D-ro Albault skribis pri proceduro por kandidatoj por la Akademio. En la 5-a alineo li skribis: ". . . iniciatis kandidatigi LIN : LI skribas al pluraj . . ." Tiu vortumo kontribuas al supozo, ke devas esti iu "li". [Cathy Schulze]

R. - *Nia korespondantino ignoras uzadon de la lingvo. Evidente en tia kunteksto la pronomo li ne havas funkcion de maskulena pronomo. Mi klarigu!*

La pronomo ŝi havas nur unu funkcion, tiun de feminena pronomo : tio estas avantaĝo por virinoj, kiun ne havas viroj.

Aliparte mi atentigu, ke la pronomo ĝi rilatas nek al viroj, nek al virinoj; oni diras, ke ĝi estas neŭtra ("ne-utra").

Nun se bone konsideri la aferojn, la vera naturo de la pronomo li estas, ke ĝi estas "malneŭtra" : ĝi reprezentas unu personon, sed tiu povas esti aŭ virino aŭ viro. Oni do povus diri, ke ĝia genro estas envere "utra".

Utro estas gramatika genro ankaŭ nomata komuna genro, kiu ekzistas en diversaj lingvoj, ekzemple en la skandinavaĵoj.

Ankaŭ en Esperanto la "utro" fakte ekzistas kaj espereble ĝi estos agnoskita de niaj estontaj gramatikistoj : la pronomo li apartenas al la "utro", li estas "utra". Sed manke de alia pli taŭga pronomo ĝi povas havi funkciojn jen de maskuleno, jen de "utro" : tiam ĝi indiferente nomas aŭ virinon, aŭ viron.

Tiu konsidero povas fini poreterne la disputojn pri feminismo, pri kiuj nia lingvo kaj nia gramatiko havas nenion por fari. Ili prave limiĝu al nia movado, same kiel en la makromondo!

Tamen geviroj helpu, por ke iam ne kreiĝu virseksisma movado, ja ankoraŭ ne baptita, ĉar ne ekzistanta. Efektive en tia situacio specife mankas pronomo en la maskuleno. Versajne ni serĉu novismon el la Angla : tion postulas la etimologio de la pronomo ŝi por certigi neŭtralan ekvilibron!

D-ro André ALBAULT

"La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", kiel internacia asocio, helpas al la laboro de la Akademio 1-e/ per financaj rimedoj, 2-e/ per "LA LETERO" kiu ebligas rektan komunikadon kun la Esperantistoj kaj 3-e/ per diversaj eblaj faciligoj pri eldonoj, kunsidoj aŭ organizo de simpozioj.

Jara kotizo de membro estas 100 FF jare. Bonvolku aliĝi aŭ renovigi aliĝon por 1992.

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO". trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — *Redaktoro* : Jean THIERRY. — *Direktoro de la publikaĵo* : André BOURDEAUX. — *Presejo* : COCONNIER, 72300 SABLÉ. C. P. P. P. n-ro 6971. — *I n-ro* : 40 FRF *Jara abono* : 120 FRF Pagebla ĉe kontoj :

Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉekkonta : 735 27 B Paris. — UEA : Poŝta banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag) : precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Perantoj por diversaj landoj :

Tuta Azio : S-ro UMEDA Yosimi, I. P. O. B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club-Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (caixa postal 11 11 05), Brazilo.

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (Eo-redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Cuba.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : PO.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.

Imp. COCONNIER - 72300 SABLÉ